PILO-PRESS
Internacia Informservo

N-ro 7/1976 - 12 feb 1976
Aperas ĉiusemajne

Esperanto en Radio estas praktika utiligo de Esperanto! Aŭskultu kaj skribu al la Radio-Stacioj!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69



## Kvinjara laborplano de Itala ILEI-Sekcio 1976-1980

Massa, Italio (pp) - La Itala Sekcio de Internacia Ligo de Esperanto- Instruistoj (ILEI) starigis Laborplanon por la jaroj 1976-1980, kies ĉefa celo estas ke dum 1980 oni devas atingi la nombron de 1 000 instruistoj pri Esperanto.

El la laborplano ni citas:

"Oni povos paroli pri sukcesode Esperanto nur kiam la internacia lingvo estos regule instruata kaj oficiale lernata en la lernejoj. Dum oni daŭrigos la laboron pri la informado kaj dokumentado de diversaj instancoj, celante prepari la terenon por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn (leĝpropono - utiligo de eblecoj entenataj en la tiel diritaj "delegitaj dekretoj" - aperigo de kajeroj "K" - kunlaboro kun aliaj naciaj kaj internaciaj edukorganizoj - aperigo de faldfolioj, broŝuroj, verkoj pri la valoro de Esperanto kiel lingva interkomunikilo kaj propedeŭtika lingvo al pli bona lernado kaj kono de gepatra kaj fremdaj lingvoj kaj pri aliaj utiligoj praktikaj de la lingvo), nepre necesos havi je dispono pli da instruistoj por ricevi pli da lernantoj.

La sukceso de Esperanto en la lernejoj ne dependos de la aprobo de leĝpropono pri la instruado de Esperanto en la lernejoj; kontraŭe la sukceso de la leĝpropono kaj de Esperanto dependos de la nombro kaj kapablo kaj preparo de la instruistoj pri internacia lingvo Esperanto."

La celon de la laborplano oni volas atingi per duobligo de en- kaj eksterlandaj lernejaj kursoj kaj per duobligo de kursoj por la diplomiĝo de instruistoj; per okazigo de seminarioj kaj pedagogiaj semajnoj; per ĝisdatigo de la instruistoj pri la plej modernaj instru- kaj edukmetodoj kaj pri la plej lastaj lernolibroj kaj instruhelpiloj pri internacia lingvo Esperanto.

Plie oni povas legi en la cirkulero pri la laborplano: "La celo por 1976 devas esti ke ni, kompare kun la kursoj okazintaj dum 1975, aranĝu la duoblon de la kursoj por havi la duoblon de la lernantoj. Ĉiu esperantisto povas kaj devas fariĝi <u>instruanto</u> pri Esperanto, gvidante almenaŭ kursojn por komencantoj.

Oni ne povas atendi miraklojn de aliuloj favore al Esperanto; nur la instruantoj kaj instruistoj pri Esperanto povos okazigi la atenditan "miraklon"!!......

Por ke Esperanto fariĝu instruobjekto en la lernejoj, ne necesas pli aŭ malpli bonaj ideoj: ĉiu esperantisto devos insiste kaj persiste instrui la lingvon kaj varbi novajn estontajn instruantojn kaj instruistojn pri Esperanto.

Ĉu ni kapablos reagi al la "dolĉa mallaboro" de multaj, tro multaj esperantistoj? Ĉu la pionirspirito kiu vigligis la laborojn de la instruistoj pri Esperanto post la du mondmilitoj estingiĝis?

Sen instruado, ne ekzistos estonto por Esperanto!

Daŭrigo sur p. 2

Daŭrigo de Kvinjara Laborplano...

Ankaŭ se sur la kapo de la homaro amasiĝas densaj mallumoj kaj tempestoplenaj nuboj, ni instruistoj konscias ke super la nuboj estas la suno kaj nia tasko estas la laborado por helpi la homojn atingi la sunplenan vojon de scio, kulturo, interkompreniĝo kaj paca kunvivado."

Sekciestro de la Itala ILEI-sekcio estas d-rino prof. Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.

ILEI-Konferenco en San Marino

San Marino (pp) - Danke al profesorino Marina Michelotti, novbakita sekciestrino de ILEI en San Marino kaj al gekolegoj el Cesena, la X-a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) okazos de la 23-a ĝis la 29-a de julio 1976 en la Respubliko de San Marino (Casa Esercizi di S. Giuseppe Valdragone).

Kiel kutime, ĉiuj partoprenontoj loĝos, manĝos kaj laboros en la sama ejo, tio estas granda, moderna kolegio, kiu kapablas gastigi ĝis 170 personoj.

Kadre de la konferenco okazos la asembleo de ILEI la 28-an de julio, en kiu oni novelektos la estraron por la laborperiodo 1977-1979.

Por aliĝi oni skribu al D-ro Prof. Mario Dazzini, ĝenerala sekretario de ILEI, C.P. 22, I-54 100 Massa C., Italio.

Jam amasa aliĝo al Itala Esperanto-Kongreso

Massa (pp) - Ĝis la 31.1.1976 jam aliĝis 301 personoj al la 47-a Itala Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Massa de la 18-a ĝis la 24-a de septembro 1976. Krom la kutimaj eroj oni antaŭvidas publikan manifestacion, teatran prezentadon kaj ekskursojn.

La kongreskotizo por eksterlandanoj estas 2.500 liroj. Aliĝojn akceptas Massa Esperanto-Grupo, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.

Internaciaj Esperanto-Aranĝoj 1976 de polaj studentoj

Varsovio (pp) - La Socialisma Asocio de Polaj Studentoj aranĝas jenajn seminariojn en la unua jarduono 1976:

Seminario "Efikeco de Esperanto-Informado" de la 2-a ĝis la 4-a de aprilo: Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Universitato en Lodz, RU SZSP UŁ, PL-90-125 Lodz, Narutowicza 41

Seminario "Moderna Arto" de la 28-a ĝis la 30-a de aprilo: Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Universitato en Toruń, RU SZSP, PL-87-100 Torun, Słowackiego 5/7

"Ekonomia Seminario" de la 28-a ĝis la 30-a de aprilo Esperanto-Rondo de la Ĉefa Altlernejo pri Planado kaj Statistiko, RU SZSP SGPiS, Warszawa, al. Niepodległości 162

"Soci-interlingvistika Seminario" de la 1-a ĝis la 4-a de majo Interlingvistika Scienca Rondo de Universitato de Poznań RU SZSP UAM, PL-60-813 Poznań, Zwierzyniecka 7

"4-a Studenta Interlingvistika Seminario" de la 5-a ĝis la 9-a de majo

Interlingvistika Scienca Rondo de la Varsovia Universitato RU SZSP UW, PL-00-325 Warszawa, Krakowskie Przedmieście 24

Ne plu "Hot dog" en Francio

Parizo (pp) - Ek de 1977 en Francio estas malpermesite, uzi fremdlingvajn esprimojn en anoncoj kaj dokumentoj destinitaj por la vendado de varoj. Laŭ ĵus akceptita leĝo anoncoj, preskriboj, fakturoj kaj kvitancoj devas esti skribataj nur en franca lingvo. Se ne ekzistas oficiala franca vorto, la fremdlingva nocio devas esti klarigita en franca. Iniciatinto de la leĝo estas La Franca Akademio, kiu penas purigi la francan lingvon de anglaj esprimoj en la komerca vivo kiel "Hot dog" kaj "After shave".

************

La opinio de leganto

Interesa, instiga kaj profitdona mi trovas vian serion pri varbado kaj informado.

Nur, kritiko estas ja bona afero, sed estus pli bone, se la kritikantoj ankaŭ mem farus tian laboron pli bone kion ili ĉiam konsilas al la aliaj por fari. Konsilojn kaj kritikojn mi ricevas sufiĉe dum la tuta jaro, sed se mi petas laboron de la konsilantoj mi tuj estas sola.

Josef Weidacher, München

************

Esperanto en Radio

Svisa Kurtonda Servo. Interesan prelegserion pri la reto-romanĉa lingvo nuntempe faras d-ro Arthur Baur. La tria prelego en tiu serio okazos la venontan lundon, je la 13,20 horo resp. ĵaŭdon, je la 22,45 horo. Tiu prelegserio fakte valoras esti publikigita!

Ges-roj Gacond ĉiam ankoraŭ parolas pri la "Literatura Mondo", la fama literatura revuo. Cetere, antaŭ kelka tempo reaperis la 5-a volumo kiel fotokopio!

Varsovio. En unu el la lastaj leterkestoj oni citis la leteron de Thomas Bormann, Hamburg, kiu proponis, ke la lokaj grupoj enkonduku Esperanto-Ekspreso-Kunvenojn, dum kiuj oni reaŭdigu la surbendigitajn eldonojn de Esperanto-Ekspreso. Sendube tio estas bona propono, sed esperantistoj devas alkutimiĝi/ne nur pri-Esperantajn programojn, sed ankaŭ la kulturajn, ekonomiajn kaj politikajn programojn. Radio-stacio, ĉu Varsovio, Vieno, Romo ktp., ja ne estas institucioj de la Esperanto-movado. Kaj ĝia ekzisto dependas ĉefe de reagoj al tiuj ĝeneralaj ne-Esperantaj temoj. Lasttempe oni povis aŭdi informojn kaj komentojn pri la partiaj kongresoj de la tri polaj partioj kaj pri la nova konstitucio de Pollando. / aŭskulti

Zagrebo. Vere interesa estis lasttempe radia artikolo pri "entuziasmuloj", kiuj volis eldoni gazeton. Tia "entuziasmo" ankaŭ regas inter esperantistoj, kiel montras la historio de la Esperanto-gazetaro. Depost kelka tempo Radio Zagrebo nun ankaŭ disaŭdigas regule kelkajn informojn el la Esperanto-movado je la fino de la elsendo. Lastfoje oni menciis cirkuleran leteron de prof. d-ro Ivo Lapenna, en kiu li klarigis la kaŭzon de sia eksiĝo el UEA. Pri la enhavo oni nenion aŭdis, ĉar la aŭtoro ne permesis fari citaĵojn, sed nur publikigi la tutan leteron!

Romo. La lastdimanĉa elsendo okupis sin pri la Respubliko de San Marino, kie ĉi-jare okazos la Internacia ILEI-konferenco. Alia programero temis pri la nova anteno de Vatikana Radio. Kiel kutime oni ankaŭ aŭdis leterkeston!

Pekino. Tiu stacio estas ĉiam bone aŭdebla ĉi tie. Estis interese aŭdi la ĉinan starpunkton pri la Angola konflikto.

## La miksita paĝo

### Peĉo

Knabo erarante proksimiĝis al knabino,
kiun li kredis esti lia amikino,
kaj ĉar li estis flama karanto,
li ĉirkaŭprenis ŝin kiel adoranto.

Diris la fremda:"Mi ne ludos ludilon,
kaj krome mi jam havas mamtenilon!" R. Maier

### Miskompreno

Diris patrino
al sia filino:
"Se via ano
kuŝos sur vi,
patrino de l'infano
baldaŭ estos vi!"

En sekvanta jaro
okazis la faro!
Diris filino
al sia patrino:
"Kredu al mi:
Mi kuŝis sur li!!" R. Maier

******************

### Antaŭ 50 jaroj

### Resonado 1

La jaro 1925a malaperis en la eterneco de l' universo. Ĉu ĝi progresigis nian movadon? Rilate al Germanujo, kiu speciale intersas la legantojn de Germana Esperantisto (G. E.), oni povas diri: jes kaj ne. Jes - pro la rimarkinda plidisvastiĝo de la i d e o de Esperanto, kio kaŭzis evidentan pliinteresiĝon de oficialaj postenoj kaj aliaj kompetentuloj pri nia lingvo. Dro Steche bonege raportas pri tio sur aliaj paĝoj de ĉi tiu numero. Ne - pro la ne-, eĉ malkresko de la a n a r o de Esperanto, almenaŭ de la organizita, kiu sola ja nur estas statistike kaptebla. Mi ne bezonas pruvi la diritaĵon, ĉar ĉiu atentema leganto de G. E. estas sufiĉe bone informita pri ĝi. La ŝajna kontraŭo inter la du faktoj estas facile klarigebla Unuflanke la internaciaj rilatoj ĉiuspecaj nun pli kaj pli urĝe postulas la uzadon de neŭtrala lingvo internacia.........Aliflanke la ekonomiaj cirkonstancoj de kelkaj monatoj estas tiel malbonaj, ke la homoj ne havas monon por okupi sin pri senprofita afero, kia E nun ankoraŭ estas........ Eko

Germana Esperantisto No 1, Januaro 1926, p. 12

### Resonado 2

Parolo estas arĝento, oron similas silento. Ĉar en la nuna tempo de ekonomia mizero mi ŝatas oron pli multe ol arĝenton, mi volas akiri oron per tio, ke mi ne babilas en ĉi tiu numero. Mi lasas la parolon al aliaj kunlaborantoj, kiuj scias rakonti ion pli bonan..... Eko

Germana Esperantisto No 2, februaro 1926, p. 31

### Radio Bervalio respondas

Demando: Ĉu Esperanto venkis en Francio?

Respondo: Principe jes! Sed ne venkis esperantistoj, sed la lobio de la hundoj. Laŭ interveno de la Franca Akademio komercistoj ne plu rajtas reklami por "Hot dogs", sed nur por "varmegaj kolbasetoj".

Pilo-Press Semajna Informa Servo, Jara abonkotizo 30,-- GM
Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851